

POLA ESPERANTISTO

(Esperantista Polski)

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ.

Redakcio kaj Administracio: Widok 19, Warszawa.

Abono: $\frac{1}{4}$ jare 1.50 zł., $\frac{1}{2}$ j. 3 zł. jare 6 zł., Eksterlande egalvaloro

Konto en P. K. O. Nr. 11.026

La Redakcio ne resendas manuskriptojn — konservu kopion.

Redaktoro kaj eldonanto:

STANISŁAW KAROLCZYK

PROTEKTOROJ:

Prof. Dr. Odo Bujwid, Jan Kostecki, Dr. Emiljan Loth.

ŜIBTENANTOJ:

Ing. Roman Iwo Dobrzański, Antoni St. Stankiewicz.

HELPANTOJ:

Dr. Ignacy Dziezic, Włodzimierz Miernicki.

ENHAVO:

Alexy Leszek-Lasiński: Esperanto. — Prof. O. Bujwid: Edinburga Kongreso. — H. Stenkiewicz: Rememoroj el Maripoza (Trad. M. T.). — A. Wieczorkiewicz: Polaj proverboj. — Internacia Instituto de Intelakta Kooperado. — Bibliografio. — M. Karłowicz i L. Żaroń: Z cdczytów o jez. Esperanto. — Pollanda kroniko. — Ze świata esperanckiego. — Ricevita letero.

Nowe uzupełnione wydanie

Kompletnego podręcznika

jęz. Esperanto

Leo Turno, członka Komitetu Językowego

ukazało się nakładem autora i jest do nabycia
w cenie 1.25 zł. za egzemplarz.

Wysyła się conajmniej 5 egz.

Przy zamówieniu 10—25 egz. udziela się 25 proc.
rabatu, 25—50 ekz.—30 proc. rabatu, 50—100 egz.—
● 33 i pół proc. rabatu.

Wysyłkę uskutecznia się po otrzymaniu należności
na P. K. O. Kraków, № 405-716 lub na adres:

Leopold Dreher, Kraków,

Starowiślna 37.

U E A

bezonas 10,000 membrojn

Adreso de delegito:

S-ro **Stanisław Essigman**

Warszawa, Marszałkowska 130.

POLA ESPERANTISTO

(Esperantysta Polski)

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ.

JARO XX. Warszawa, Julio—Augusto 1926, Nr. 7—8 (125—126)

Alexy-Leszek Lasiński.

E s p e r a n t o

zrzuca z ludzkości przekleństwo

Babelu.

Słowo wstępne, wygłoszone na zebraniu
org. Klubu Esper. w Ratuszu kaliskim
dnia 9 sierpnia 1926 r.

Do odwiecznych trudności, jakie na drodze do postępu kulturalno-cywilizacyjnego spotyka ludzkość, należy bezwątpienia różnojęzyczność narodów.

Najdobitniej tę trudność określa Biblia, skoro różnojęzyczność traktuje jako przekleństwo Boga, rzucone ongiś na ludzkość.

Z drugiej strony, ludzie oddawien dawna marzyli o jedności języka, jak marzyli o lataniu na wzór ptaków.

Musimy zdawać sobie z tego sprawę, że, jeśli próby lkaara prędej zostały zrealizowane, niż marzenia ludzkości o jednym języku powszechnym, to stało się to z przyczyn całkiem zrozumiałych, choć dzisiaj już niedostatecznych.

Był czas, że stosunki międzynarodowe nie były znane, w takim znaczeniu, jak to rozumie się dzisiaj.

Był czas, że w stosunkach międzynarodowych nie liczono się z milionami, które nie miały wtedy prawa obywatelstwa.

Były takie stosunki polityczne, społeczne, religijne, że mimo wewnętrznej żądy, mającej na względzie język h n y, ludzkość mogła obejść się bez takiego języ-

ka, bo w najgorszym razie zastępowała go wystarczającą wtedy łaciną.

Później, gdy nawet czasy najlepsze się zmieniły, uczucia nacjonalne bały się dopuścić do hegemonji jednego języka.

Szalona obawa czynników konserwatywnych przed kosmopolityzmem nie ma dziś, w dobie najdalej idących stosunków międzynarodowych, tej podstawy, jaką miała jeszcze przed ostatnią wielką wojną.

Jak Liga narodów jest, niestety niewykończonym jeszcze, symbolem zdobyczy, jakie ludzkość posiadała w spadku doświadczenia, tak Esperanto jest wyrazem najpotężniejszego czynu ludzkości, jaki dokonywa się w naszych czasach.

Zdawało się na oko, że okres pary i elektryczności to już ślepy tor postępu. Tymczasem przyszło radio, tymczasem przyszło lotnictwo, rad i.. Esperanto.

Z całą pewnością, możemy dziś twierdzić, że wiek 20. będzie nazwany wiekiem języka powszechnego, wiekiem Esperanta.

Nic dziwnego, że ci i owi dziś jeszcze niedowierzająco potrząsają głowami.

Starczy przypomnieć, że to samo było z lotnictwem, a radu i kieszonkowych aparatów radiowych nawet nie domyślano się jeszcze kilkanaście lat temu.

To też ci, którzy pierwsi ogłosili światu Esperanto, mieli prawo liczyć na jego zwycięstwo.

I dzisiaj to zwycięstwo jest rosnącym stale jak lawina faktem.

Albowiem, jak powiada jeden z pisarzy, „gałęzie czarodziejskiego drzewa Esperantyzmu, którego potężne korzenie wyrosły z gruntu naukowej filozofji wszystkich języków, już poszumem liści rzuciły śpiewne nuty swoje w dal bezmierną: na brzegi Atlantyku, Oceanu Spokojnego, na zielone wybrzeża Anglji i na kwitnące zatoki francuskie, na Kongresowe place wielkich miast Europy i szczyty Alp szwajcarskich. na olbrzymie mury Washingtonu, na ulice stołeczne Paryża i Londynu, Moskwy i Berlina; trafili do serc gorących zwolenników w japońskim Jeddo i w indyjskim Bombaju, do Meksyku i do Brazylji, do Sydney i Egiptu; szumiały pieśnią entuzjastyczną „Espero“, wśród tłumów, przybyłych na 18 kongresów z najodleglejszych punktów kuli ziemskiej i dzwonią nad pięknymi równinami ziemi mazowieckiej...

To też nic dziwnego, że Twórcę tego języka i pierwszych apostołów Esperanta świat cały otacza najgłębszą czcią. Na cześć twórcy Esperanta w starożytnym Cambridge defilował szwadron jazdy i składało mu hołdy

Ciało Akademickie, w Paryżu ku jego czci, gdy jechał z Prezydentem dźwięczała Marsyljanka, a Republika darzyła go krzyżem Legji Honorowej; w Hiszpanji król ofiarował mu order Izabelli Katolickiej, w Bernie za błogosławieństwem Papieża mowa jego brzmiała w świątyniach z kazalnicy w Antwerpii studenci wyprzęgali konie z powozu i wieźli go w porywie radości do gmachu kongresowego, a w Krakowie w dni VIII-go Kongresu, szły tłumy za jego przewodem, z hymnem „Espero“ na ustach, na starożytny Wawel i składały na Rynku zielone chorągwie Esperanta na kamieniu pamiątkowym Kościuszki, zaś w kopalniach Wieliczki zapalały się dlań wszystkie światła, jako w dni przyjęcia monarchy.

Bo też „on był tym, który dał ludzkości, zasobnej w materjalne środki komunikacji, duchowy telegraf. Wspólne słowo dla stosunków międzynarodowych, drugi pomocniczy język obok ojczystego — kosmopolityczną złotą oprawę dla brylantu mowy rodzinnej, on był tym, który w swój neutralny język włożył serce polskie — nasz akcent na przedostatniej sylabie t. j. rytm duszy polskiej w języku, przedtem jednym, dziś znanym i drogim całemu światu esperanckiemu“.

Był on według słów znakomitego matematyka franc. Carlo Bourlet, „Kopernikiem w dziedzinie mowy ludzkiej“ To też nic dziwnego, że Leo Belmont powiedział w Warszawie: „Wierzajcie mej napoły zuchwałej przepowiedni, że ten Człowiek, który tak chlubnie zaświadczył o udziale Polski w wielkim kulturalnym ruchu ludzkości, za lat sto będzie miał pomniki we wszystkich stolicach świata“.

Chcę podkreślić jeden znamieny fakt. O ile twórca Esperanta dr. Zamenhof nigdzie nie podkreślał swego pochodzenia, owszem wszędzie mówił gorąco o Polsce, o Warszawie, jako kolebce języka powszechnego, o tyle u nas są ludzie, którzy nie mogą pogodzić się z Esperantem, dlatego, że twórcą jego jest właśnie, nieżyjący już dzisiaj, dr. Zamenhof.

Dodać trzeba, że nigdzie w świecie, poza Polską, nie wzięto tej okoliczności tak tragicznie pod uwagę, nie wyłączając nawet takich autorytetów jak Stolica Apostolska.

Niedobrze jest w Polsce, że katolicyzm polski chce być plus catholique que le Pape.

A jeśli Esperanto nie stało jeszcze na takim poziomie rozwoju, na jaki zasługuje, to wina wielkiej wojny i związanych z nią antagonizmów narodowych, rozpetanych nacjonalizmów, fanatyzmów, szowinizmów i całej plejady ultra-nacjonalnych „izmów“, którym przewodzili głównie wszechwładni Niemcy.

Dziś postać rzeczy zmienia się z dniem każdym.

To też tu i owdzie ludzie dobrej woli zakładają ogniska esperanckie.

Dlaczegoby Kalisz, jedno z najzaszczytniejszych miast Rzeczypospolitej, nie miał zorganizować w swem łonie zwoleńników Esperanta?

Z tych założeń wychodząc, pozwoliliśmy sobie prosić Przedstawicieli władz i społeczeństwa, w tej intencji, by obecnością swą uświetnili zebranie organizacyjne Klubu Esperancckiego w Kaliszu oraz, by zechcieli łaskawie iść temu ruchowi na rękę, w zakresie swej kompetencji urzędowej i obywatelskiej.

Bo...

Zbliża się dzień, kiedy nie będzie już człowieka, nad którym wisiałoby jeszcze biblijne przekleństwo Babelu.

Niech żyje Esperanto!

Prof. O. Bujwid.

Edinburga Kongreso

S-ro Cart prezidanto de la Esp. Akademio tute pravedum la ferma kunsido nomis ĝin-ĝoja kongreso. Estis vere tre sukcesa, bonege organizita. Oni ne devas ankoraŭ forgesi, ke Edinburgo estas la plej bela urbo de Skotlando-beleglando. Ni ĉiuj konas tiun ĉi landon el la romanoj de Walter Scott, legitaj dum nia juneco Ivanhoc, Kenilworth, Quentin Durward, kaj multaj aliaj, kiun mi tute juna, kiel 14 jara knabo, dum tutnokta legado admiradis. Impona estas Skotlando, ne malpli multe imponaj estas sovaĝaj ŝtonegoj kaj belaj, sed iom severaspektaj sur ili starantaj kasteloj, ofte memoraĵoj de krunelaj bataloj.

La sevaraj tempoj forpasis restas ĝoja, belega lando kun vere belega Edinburgo-nia Kongresa urbo.

Mi kun mia filino sinjorino d-rino K. Rouppertowa atingis Edinburgon, veninte de Hamburgo per marvojo, kiu ne estas tre rekomendinda. Vojaĝo transmara al Grimsby ne estas komforta, ofte malagraba.

Ne konate ĝis nun la Nordan Maron mi volis unuan fojon ekkoni ĝin kaj pagis per sufiĉe forta marmalsano. Depost tiam ni ne konsilas fari longedaŭran maran vojaĝon al Britlando.

Vojaĝo en Britlando estas multekosta ankaŭ la vivnutraĵo kaj loĝejo. Sed la organiza komitato faris ĉiun eblon por faciligi al la Kongresanoj la restadon dum la daŭro de la Kongreso. Loĝejoj en privataj pensionoj estis ne tro multekostaj, nutrado ĉe la restoracio Patrick Thomson tute ne tro kara kaj tre bongusta—Oni eĉ faciligis la veturadon tra la urbo per senpaga tramveturado.

S-ro prezidanto Page, s-roj Warden, Harvey, kun aro da maljunaj kaj junaj helpantoj laboradis dum la Kongreso tute admirinde. Ĉio funkciis akurate sen unu minuto de perdita tempo. Ekzemplo por ĉiuj Kongresoj!

Skota Esp. Federacio kaj Edinburga esp. societo aranĝis 31—7 tradician interkonatiĝan vesperon en granda salono de Awembley Hall (Kunvena Halo) de la Skotlanda eklezio, al kiu apartenas 19 liberaj Skotlandaj kaj Anglaj ekleziaj societoj.

Oni komencis interkonatiĝi per kantoj, oni finis kongreson per kantoj. Sed oni ne elĉerpis la amason da kantoj esperantigitaj el ĉiu lingvoj, kiujn enhavas ĵus aperinta Skota kantaro esperantista. Kelkaj kantoj estas tiel homaranaj, kortuŝaj, precipe skotaj, ke ili certe restos kiel modelaj esperantaj kantoj por la tuta esperantistaro.

Dimanĉe s-ro prof. pastro Bailey el Londono predikis dum la diservo en la katedralo s. Giles. Admirinda estis la lingvo tre bonstila, kiu ne ofte okazas en Esperanto — sed ankaŭ oni rekonis tre profunde pensantan homon, kies altaj ideoj ne ofte estas troveblaj dum nia malklara vivo.

Posttagmeze oni faris belan promenadon al la Zoologia ĝardeno, kie ne nur sovaĝaj bestoj sed ankaŭ mildaj esperantistoj trovis nutraĵon. Ne modestan nutraĵon en belega restoracio por malgranda mono. Oni ja scias, ke en Britujo, dimanĉe, oni povas malsati pro la fermo de ĉiuj restoracioj.

Tre pitoreska ĝardeno, belega vetero—gaja promonado plenigis por ĉiuj kongresanoj tre memorindan tagon. Oni devas aldoni, ke nia afabla prezidanto s-ro Page funkciadis dum la promonado kiel leterportisto, prezentante al multaj kongresanoj, persone, invitojn por estonta ĉe li lunĉo. Tute malofta afableco.

La malferma kunsido okazis lunde en la salonego de Awembly Hall. Unue parolis s-ro Pergus Harris en la nomo de la Urbestro. Sekvis aliaj paroladoj; pri la detaloj vi povas informiĝi en № 8—9 de „Esperanto“. En la nomo de la vicprezidanto de la Kongreso estis nomita la subskribinto. Inter multaj salutparoladoj estis du el Pollando: S-ro Essigman en la nomo de Pola Esp. Asocio kaj fino Muszkatblatt en la nomo de „Konkordo“.

Oni devas mencii, ke la Somera Universitato malfermigita de S-ro Bovet, fama profesoro kaj direktoro de Inst. Rousseau en Ĝenevo. Dum la prelegoj ĉiutage okazigitaj pri la folkloroj: franca, germana, pola, hebrea, kataluna; pri la suno, pri la radio, pri bakterioj—ĉiam ĉeestis tre multnombra aŭskultantaro.

El pollando la subskribinto prelegis dufoje pri infektiĝaj malsanoj kun lumbildoj.

Urbestro de Edinburgo afable invitis gekongresanojn en la belegajn salojn de la Artlernejo. Oni povis ĉi tie admiri belajn skotajn kostumojn kaj tre interesan, iom sovaĝan skotan montaran muzikon je la sakfajlo tre simila al nia montarana k o b z a.

Ĉiutage ni havis kantojn aŭ koncertojn. Ne okazis teatra prezentado.

Plej bela, vere bonege sukcesa, estis la merkreda ĥora kanto en Central Hall. Por tiu vespero speciale venis el Glasgow la orfea horistaro, kiu majstrege kantis multajn britajn kaj skotajn kantojn. Tiu ĉi ĥoro estas vere unu el la plej belaj okazintaĵoj dum la Edinburga kongreso. Oni devas ĝin aŭdi por juĝi kaj sufiĉe admiri. Estas vere dezirinde, ke tiu ĥoro vizitu Eŭropajn landojn kaj ankaŭ Polujon.

Oni faris ankaŭ oratoran konkurson. Unuan premion ricevis s-ro Olŝvanger, la 3-an s-ro Grenkamp-Kornfeld.

La balo en la palaco de danco en naciaj kostumoj, bedaŭrinde ne multenombraj, estis la las'a komuna ĝojega kunveno. Inter kelkaj kostumoj oni rimarkis tre belan krakovan kostumon de f-ino L. Zamenhof.

Dum la kongreso okazis ankaŭ du sciencaj kunvenoj: kuracista kaj sciencista. Oni preparolis kelkajn administrajn aferojn kaj faris propagandon por Esperanto.

El tiu ĉi vidpunkto menciindaj estis tre interesaj ekskursoj, kiujn aranĝis s-ro Lechmer Oertel kaj fama inĝeniero Gueritte gvidante min al haveno Dundee, al Berwick kaj Newcastle.

Dum la ekskursoj ni povis viziti interesajn konstruaĵojn de s-ro inĝ. Gueritte, diversajn fabrikejojn ekz. jutfabrikejon en Dundee, mondkonatan Armstrongan fabrikon de lokomotivoj kaj kanonoj.

Trege interesa estas konstruita el ferbetono ponto de s-ro Gueritte, kiu estas unu el plej grandiozaj konstruaĵoj de tiu arto. Ĉie dum la vizitado la ĉeestantaro neesperanta admiris la facilecon de interkonpreniĝo inter la esperantistoj, vizitantaj la urbojn.

La urbestroj de Dundee, Bervik kaj precipe Lord Major de Newcastle—nia lasta vizito — ĉie preparis al la sciencista esperantistaro tute ne supozitan bonegan akcepton. Ĉie oni faris komunan fotografadon kaj lokaj ĵurnaloj priskribadis la esperantan viziton en detalaj artikoloj.

Oni povis rimarki, ke en Britlando kreskas la movado esperanta.

Mi vizitis la britan Asocian en Londono, kies sekretario s-ro Buttler montris al mi afable la ejon kaj bibliotekon. La laboro estas brilega: oni vidas, ke en malmulte da tempo la esperanta movado ampleksos Britlandon eble pli rapide ol aliajn landojn de la kontinento.

Henryk Sienkiewicz.

Rememoroj el Maripoza.

(d a u r i g o)

— Bonan vesperon, sinjoro — ili diris afable, preterirante. Kaj la homoj ĉi-tie estas iel favoraj, ĝentilaj. Vere, kiam venos la maljuneco, mi ekpensos ne unu fojon pri tiu kvieta Maripoza. De supre estis aŭdata voĉo de gruoj, traflugantaj ien al Oceano. Mi iom luliĝis kaj en-reviĝis. La stranga kunigo de impresoj! Sed mi revenis la hotelon preskaŭ kortuŝita kaj iel sopira. Mi komencis pensi pri la hejmo, pri la miaj, kaj ankaŭ mi komencis kanti, sed ne „Yankee Doodle“. Ho ne! Mi kantis: „U nas inaczej! inaczej! inaczej!...“ *)

— Puk, puk, puk!

— Mi estas scivola, kiu povas esti — mi ekpensis.

— Puk! puk!

— Come in.

Eniris la mastro. Kiaj homoj! kia lando! Ankaŭ tiu havas mienon tute kortuŝitan. Li proksimiĝas al mi, premos forte mian manon kaj, ne lasante ĝin, foriĝas je longo de la brako, rigardante min, kvazaŭ li volus min beni.

Mi malfermas la buŝon kaj mia miro egalas lian kortuŝon.

— Mi ekvidis en la hotela libro... — diras li: — vi estas el Polujo?

— Jes. Ĉu vi ankaŭ estas Polo?

— Ho ne! mi estas Badenano.

— Ĉu vi en Polujo?

— Ho ne! neniam...

— Do?...

Miaj okuloj malfermas sin tiel larĝe, kiel la buŝo...

— Sinjoro, — diras la mastro — mi servis sub Mierosławski.

— Ĉu vere?!

— Li estis heroo! li estis plej granda komandanto en la mondo. Kiel feliĉa mi estas, ke mi vin vidas... Ĉu li ankoraŭ vivas?

— Ne, li estas mortinta.

— Mortinta — diras la Germano, kaj sidiĝinte, senvole mallevas la manojn sur la genuojn, kaj la kapon sur la bruston.

Mi mem ne sciis, kio decas al mi fari. Mi ne partoprenis entuziasmon de sinjoro Billing por M., sed en tiu momento

*) Pola sopiva kanto de Kornel Ujejski: „Ce ni aliel aliel aliel...“

la entuziasmo estis por mi agrabla kaj flatis min. Dume sinjoro Billing venkas sian malĝojon, kaj lia adoro por M. fluas per kaskado, kompare kun kiu nenio estas Niagara aŭ Yosemite Falls. En miaj oreloj sonas nomoj de kalkaj herooj el la antikveco, de kelkaj el la mezepoko, poste de Washington, Lafayette, Kościuszko kaj Mierosławski; poste mi aŭdas tiajn vortojn, kiel: libereco, progreso, civilizacio, mi aŭdas da ili centojn, milojn. La elokventa generalo havis, videble, elokventajn soldatojn.

— Li estis ideala homo! — ekkrias fine mia mastro.

— Ĉu li tia estis, aŭ ne, tio estas bagatelo — pensas mi — sed estas fakto, ke vi, pozitiva Germano, se vi havas en vi ion ajn idealan, per stranga okazo, vi tion ricevis de la Polo. Sen li, ergo, sen ni, penso via eble neniam flugus super dolaroj, business kaj profitoj el via hotelo. Vi kaptus nur avide turistojn, veturantajn al Big - Trees kaj vi flatus ilin, kiel vi min flatis, kaj jen nun la supera animo blovas en vin, kiel en organon — kaj vi ĵetas vortojn, kiuj jam acidiĝis kiel malnova biero en Eŭropo, sed kiuj tamen ne ĉesis esti plej noblaj vortoj, kiajn atingis la homa lingvo. En malnova Eŭropo estas eble nur sola loko, kie oni ilin traktas ankoraŭ serioze kaj ilin eldiras kun larmo en okulo, aŭ iatempe kun doloro, ĉar la alioj malestimas tiun trezoron aŭ ĝin mokas. Bedaŭrinde... Kaj en tiu loko iafoje ankaŭ... bedaŭrinde — ho bedaŭrinde! Kia honesta Germano; al li imponas nek Sadowa, nek Sedan, li sole rememoras M. kaj sian Badenon. Kia bonkora Germano! Lia adreso: Billing's Hotel, California, Maripoza County. Adreso de tia Germano estas ja notinda. Oni devos por lin trovi ĝis Maripoza veturi.

All right!

Li dume ripetas: Ah, tiu M...! kaj viŝas la okulojn, videble viŝas la okulojn. Ora animo!

— Al mi estas tiel agrable pro tio, ke mi vin vidas, kvazaŭ mi trinkus whisky kun zingibrol — diras li al mi, premas mian manon, premas ĝin duafoje, triafoje kaj direktas sin al la pordo. Apud la pordo li brue frapas la frunton per sia mano.

— Sed! — li diras. — Jen mi forgesis! Ja ĉi - tie estas via samlandano.

— En Maripoza?

— Ne, li loĝas en la arbaro Sed ĉiuvendrede li alvenas foiron kun mielo kaj restas tutan nokton. Maljuna homo. Tre bona, tre bona! Li ĉi-tie estas preskaŭ dudek jarojn. Tie ĉi estis neniu, kiam li venis. Morgaŭ mi alkondukos lin al vi.

(d. s.)

Tradukis M. T.

Polaj proverboj.

El nubo granda,
Pluvo malgranda.

*

Ne pagas riĉulo,
Sed pagas ŝuldulo.

*

Kie diablo ne povas,
Tien virinon li ŝovas.

*

Al malsatuloj
Pano ĉiam en okuloj.

*

Estas virto, ke dum tentoj,
Tenu langon post la dentoj.

*

Oni ne faros eĉ en Parizo,
Avenon—la rizo.

*

La grajneto al grajneto,
Kaj foriĝos mezureto.

*

Ne ekzistas voj' malbona,
Al knabino tre sindona.

*

Eĉ rostita kolombeto
Mem ne iros al buŝeto.

*

Oni preĝas ĉe l'figuro,
Sed sub haŭto la vipuro.

*

Ne por hunda raso
Estas la kolbaso.

*

Kaldrono polon riproĉigas,
Vane, ĉar ambaŭ malpurigas

*

Kiel al vi litpretigos
Vi tiele vin dormigos.

*

Kia patrino,
Tia filino.

*

Kia ago,
Tia pago.

*

Volus animo paradizon iri
Sed pekoj ne lasas, ĝin tien
trairi.

*

Pli bone malfrue aŭ iam
Ol neniam.

*

Musoj dancas kaj festas
Se kat' hejme malestas.

*

La homon tiun per la bastono,
Kiu ne gardas pro sia bono.

*

Li ne kredis kaj murmuris,
Kis kiam ne almezuris.

Trad. A. Wiczorkiewicz

Abonu kaj abonigu por Via gazeto!

Internacia Instituto de Intelekta Kooperado.

La movado de internacia reorganizado kiu datas de la fino de la milito kaj kies plej alta esprimo estas la Ligo de Nacioj, ne povis preterlasi la intelektajn problemojn. Post la organizo de laboro, post la higieno, la tranzito kaj post multaj aliaj reguligoj diskutitaj en Genevo sub la signo de la internacia kooperado, ŝajnis ke la kampo de scienco, de literaturo, de arto kaj de instruado devas esti ankaŭ alcelita per la bona komuna volo kaj organizita el vidpunkto de komuna intereso.

Tuj post la milit-fino multaj alvokoj estis adresitaj al la Ligo de Nacioj, por ke ĝi plenumu tiun ĉi volon.

La 18 de Septembro 1920 la Ĝenerala Kunveno de la Ligo de Nacioj voĉdonis rezolucion invitante la Konsilantaron partopreni kiel eble plej larĝe en la klopodoj realigi la internacian organizadon de intelekta laboro. Tuj de tiu momento la ĝenerala sekretario antaŭvidis la kreon de nova organismo. Kaj en jaro 1922 ekfunkciis Komisiono Konsistanta el 12 poste el 14 membroj sub la prezido de franca filozofo Bergson, kies celo estis studado de internaciaj problemoj de intelekta kooperado kaj edukado. Dotita tamen per nesufiĉaj rimedoj tiu ĉi Komisiono konstatis tuj, ke al ĝi estos eble nur prepari, sed ne efektivi

la programon. Unuvorte por entrepreni la profundajn studojn kaj postsekvi la multflankajn traktadojn la Komisiono de Intelekta Kooperado bezonis Konstantan oficejon kun oficistaro kaj monon.

En Julio 1924 Francujo per letero de la Ministro de Publika Instruado proponis la pagon de elspezoj por la dezirata Instituto sub la Kondiĉo, ke la sidejo de la Instituto estu Parizo; cetero la L. d. N. pere de la Komisiono de Intelekta Kooperado administros la novan Institucion laŭ sia ebleco; oni devis precipe krei grandan Sekretariejon de unu Konsilanta Komisiono de la Konsilantaro de la L. d. N. do *Institucion pure internacian*.

Tiu propono estis akceptita de la Ĝenerala Kunveno de la L. d. N. en Septembro 1924. La Ĝenerala Kunveno komprenis, ke oni devas fondi „*clearing house*“ de intelektaj internaciaj rilatoj.

En Majo 1925 la Komisiono de Intelekta Kooperado reguligis detale la funkciadon de la estonta Instituto kaj ĝian regularon. La 16 de Januaro 1926 la Internacia Instituto de Intelekta Kooperado estis inaŭgurita en la centro de Paris en Palais-Royal, kies gravan parton ĝi okupas; la Konstruaĵon Montpensier post la Palais-Royal.

* * *

La Instituto konsistas el ses sekcioj kiuj respondas al ĉefaj grupoj de solvotaj problemoj kun dudeko da oficistoj helpataj de nur necesegaj kunhel-pantoj.

La direktoro de la Instituto estas franco s-ro Julien *Luchaire*. La ĉefoj de la sep sekcioj:

- 1) Sekcio de ĝeneralaj aferoj
- 2) Sekcio de universitataj rilatoj
- 3) Sekcio de sciencaj rilatoj
- 4) Sekcio de literaturaj rilatoj
- 5) Sekcio de artistaj rilatoj
- 6) Sekcio jura
- 7) Sekcio informa

estas respektive anglo, polo, germano, belgo, hispano, italo. La ofico de la ĉefo de literatura sekcio vakas; vicĉefo, sviso; anstataŭas dume.

Kiel oni vidas la elekto de direktoroj de la diversaj sekcioj estas sufiĉa pruvo, ke la Instituto estas antaŭ ĉio internacia organizaĵo. Ĝi estas oficejo de internacia administrado, la konstanta sekretario de la Internacia Komisiono de Intelekta Kooperado ĉe la L. d. N.

Sed kiajn punktojn devas speciale atenti la Internacia Instituto? Oni povas jam nun citi sekvantajn punktojn de ĝia agado kaj de ĝiaj projektoj:

— Kreo de la rajto de scienca propraĵo.

— Pliĝeneraligo de leĝoj kaj regularoj protektantaj la artajn verkojn kaj la rajtojn de artistoj je iliaj verkoj.

— Internacia organizado de la bibliografio kaj de scienca informado.

— Plivastigo de internacia interŝanĝo de publikaĵoj.

— Unuigo de la sciencaj nomaroj.

— Akcepto de internaciaj reguloj por faciligi la disvastigon de libroj kaj de presaĵoj.

— Akcepto de internaciaj rimedoj helpantaj la eldonan agadon kaj precipe la sciencajn kaj klerigajn eldonaĵojn.

— Akcepto de internaciaj reguloj por interŝanĝo de profesoroj kaj studentoj, egalrajtigo de diplomoj kaj de la studa tempodaŭro.

— Internacia interkonsento rilate al muzeoj kaj al art-ekspozicioj.

— Internacia interkonsento rilate al la reĝimo pri bibliotekoj.

— Preparo de internacia reĝimo por la disvastigo kaj perfektigo de kinomatografio.

— Ellaboro de registro de muzeoj.

— Fondo de Internacia Federacio de ĵurnalistoj k. t. p.

* * *

Generale la Instituto priatentas la deziresprimon de kongresoj kaj Asocioj celantaj la plibonigon de internacia intelekta kunlaborado. Aliparte la Instituto atente pristudas la ĵurnalojn, revuojn, librojn, kiuj enhavas ideojn aŭ faktojn koncernantajn al la movado de intelektaj internaciaj rilatoj kaj al la organizado de la scienco, literaturo, arto kaj instruado. Ĝi publikigas bultenojn por tiu celo.

Kaj fine ĉu oni reĝustigu la eraron de tiuj, kiuj kredis, ke la Internacia Instituto estas anstataŭonta aŭ eĉ

malhelponta la agadon de naciaj institucioj, Akademioj, Universitatoj, Internaciaj Oficejoj por intelekta disvastigo?

Fine ni akcentu: La Interna-

cia Instituto de Intelekta Kooperado estos ĉiam helpo kaj neniam konkuranto por la Intelektaj Institucioj.

Bibliografio.

Verdkata Testamento*)

S-ro Raymond Schwartz, la brila poeto kaj aktoro de la „Verda Kato“ (unua kaj unika en la mondo esperanta distilejo de la pariza humoro) donacis al ni libron sub funebra titolo de „Verdkata Testamento“. Ankaŭ bildo, kiu ornamas la kovrilon, estas malĝojiga: oni rimarkas sur ĝi malgrandan ĉarman kateton, kruele trapikitan de ia homa brutulino per moda pluvombrelo. Tamen, kiam ni turnas la unuajn sangavidajn paĝojn, la suno reaperas. Pli ĝuste ne la suno, sed la kalva frunto de nia amiko Raymond, kiu kokete sidas sur la terglobo, etendas al ni sian ĝentilan maneton kaj diras: „Nun bonvolu aŭskulti“. Aŭskultu „Katan Logon“, „Katan Strofon“, „Epikuracan Kanton“, konatiĝu kun la „Bonfara Influo de la Alkoholo“, gustumu iom da „Esperanta Salato“ kaj legu atente la „Precizan Pasporton pri la XVa Kongreso en Nürenberg“. Se post tio vi povos plue ridi, ni rekomendas al vi la „Pasportaĵojn“, la „Senharecon“,

*) „Verdkata Testamento“ de Raymond Schwartz. P. 121 in octavo. Centra librejo Esperantista, 51, rue de Cléchy, Paris. 1926. Prezo 7 fr. fr.

la kantojn pri la seka Usono, la „Pluvajn Feriojn ĉe l'mara bordo“ aŭ la „Strangan aventuron de Grafo Dormański“. Prefere tamen ne elektu. Faru kiel mi. Legu ĉion laŭvice de la unua paĝo ĝis la lasta. Se vi okaze estas malfeliĉulo, kiu ne konas la Verdajn Katon, vi havos ĉe la legado des pli grandan profiton. Dum unu horo ŝajnos al vi, ke vi ĉeestas kun sidon de tiu glora drinkemularo. Vi ekvidos oran kaj rozan mondon tra la vitro de kvara ĉampankaliko. Kaj ĝi ne estos ĉampano fuŝita. Tiuj spiritaj boteloj, kiuj portas la nomon „Raymond Schwartz“, enhavas ĉiam honestan forton kaj odoron...

Ke la rimo, ritmo kaj stilo ankaŭ estas honestaj—ne kuraĝu dubi: ĉiu verdkatano tuj vokus vin al duelo!

Jankos Tecki.

Prosper Mérimée

Mateo Falcone kaj aliaj rakontoj.

El franca lingvo tradukis

J. Borel.

Eldonejo Rudolf Mosse Berlin.

Prezo unu serio (10 egz.) 4 R.M.

Multvalora por la Esperantistaro biblioteko, kiu aperigados ĉiumonate tri volumetojn originalajn aŭ tradukitajn kaj

kiu ebligos dum daŭro de ne-
longa tempo konatiĝi kun la
trezoroj de diversnacia literaturo.

Aperinta unua volumeto
enhavas kvar literaturajn pece-
tojn, kiuj trafe ilustras la mult-
flankan talenton de la aŭtoro.

La tragedia situacio de la
patro, kiu mortigas propran
amatan filon pro tio, ke li, la
unua el sia gento faris perfid-
don (Mateo Falcone), la terura-
ĵoj de hejmmilito en Francujo,
(La sieĝo de la Rochelle), la
unuaj sentoj dum la batalo en

kiu troviĝas juna oficiro ape-
naŭ fininta la militlernejon (La
konkero de la Reduto), multege
interesa kaj plastike skribita
letero el Madrid, (Letero pri
virbovaj bataloj) ĉio-ĉi trovis
la veran spegulon en la per-
fekte tradukita libreto el franca
lingvo. La volumon oni legas
unuspire de komenco ĝis fino.
Dezirinde estus, ke en la biblio-
teko presataj estu la tradukoj
el la riĉa trezorejo de la pola
literaturo.

T. K.

Z odczytów o Języku międzynarod. Esperanto na terenie tramwajowym m. st. Warszawy

Dzięki staraniom Polskiego Akademickiego Towarzystwa Esperantystów, w szczególności zasługom p. Haliny Weinsteinówny i p. Kazimierzy Radomskiej, na terenie tramwajowym m. st. Warszawy odbyły się trzy odczyty, o języku międzynarodowym Esperanto.

A mianowicie: pierwsze dwa odbyły się dnia 26-go sierpnia b. r., za zgodą i udzieleniem sali przez Związek Tramwajarzy Z. Z. P., przy Al. Jerozolimskiej 101, następnie trzeci, dnia 2 września b. r. przy poparciu i udzieleniu sali przez Wydział Kulturalno-Oświatowy, przy Związku Tramwajowym Prac. użyt. Publ. — Wolska 19.

Prelegenci pp. prof. Jerzy Loth, red. Stefan Lubliner, vice-prezes P. T. E. Antoni Stankiewicz, literat Leo Belmont, czł. P. A. T. E. Jan Pudel, w swych obszernych i światłych przemówieniach dali poznać licznym słuchaczom o istocie i znaczeniu języka Esperanto.

Odczyty wzbudziły duże zainteresowanie u tramwajarzy, zaraz rozkupiono kilkadziesiąt podręczników i wielu zapisało się na kursy i w dalszym ciągu przybywają nowi zwolennicy.

Wszystkim, którzy wzbudzili ruch esperancki na terenie tramwajowym i zapoznali bliżej z językiem międzynarodowym, w imieniu warszawskich tramwajarzy starych zwolenników języka Esperanto i nowych adeptów składamy serdeczne podziękowania.

M. Karłowicz i L. Żaroń

Warszawa, dn. 16. 9. 26.

Pollanda Kroniko.

Warszawa.

—Pola Studenta Esperantista Societo ĉe fino de septembro organizis tri prelegojn speciale por la Varsoviaj tramvojistoj. La prelegoj okazis en loĝejo de Profesia Ligo de tramvojistoj kaj ĉe tramvojista Kulturkleriga Fakto. Paroladis s-roj prof. Jerzy Loth, red. Leo Belmont, red. Stefan Lubliner, vicprezidanto de P. E. A. Antoni Stankiewicz kaj nia administranto Jan Pudiel. La prelegoj vekis veran interesigon inter la tramvojistaj rondoj tiagrade, ke partoprenis ilin ĉirkaŭ 500 personoj. Konsiderinte la ne tre grandan nombron de nia tramvojistaro, oni devas la lastan sukceson alkalkuli al la plej gravaj.

Ni ŝuldas grandan dankon al niaj nelaciĝeblaj samideanoj-tramvojistoj s-roj Karłowicz kaj Żaroń kaj al tre agemaj membrinoj de la studenta societo f-inoj Kazimiera Radomska kaj Halina Weinsteinówna por la fervora laboro. La penadoj eldonis belan frukton. Oni malfermis kurson, kiu estas tre baldaŭ komencota. La kurson gvidos nia tre estimata samideano s-ro Leon Ferencowicz, membro de la estraro de P. E. A.

— La kooperatista gazeto

„Współnota“ komencas presigadi tre interesan esperantan fakon, kiun gvidas s-ro Ignacy Koss. Nia gazetaro estas ĉiam pli kaj pli favora por Esperanto. „Nowy Kurjer Polski“ permesis, post klopodoj de prof. Kronenberg, aperigad konstante esperantan angulon „Ziemia Lubelska“ kaj „Express Kaliski“ en ĉiu preskaŭ numero enhavas artikolojn aŭ sciigojn pri Esperanto. Guto post guto, konstante frapante..

Kalisz.

Ĉi tie esperantistoj revigliĝis Dank' al s-ro Alexy Leszek Lasiński, redaktoro de „Express Kaliski“ oni organizis propagandan kunvenon, kiun partoprenis reprezentantoj de sociaj, militistaj, urbaj kaj registaraj rondoj. La kunvenon partoprenis pli ol 50 personoj. Tuj organizita societo aliĝis al la Pola Esperanto-Asocio, kiel grupo Kalisz.

Al la organizinto same kiel al ĉiuj niaj samideanoj en Kalisz ni esprimas nian varman gratulon kaj deziron daŭrigi la verkon de nia neforgesebla eminentulo s-ro B. Szczepankiewicz, kiu la unua vekis en Kalisz la interesigon por Esperanto kaj starigis antaŭ la milito tie societon.

Zapisujcie się na kurs korespondencyjny.

Ze świata esperanckiego.

Esperanto w szkole chińskiej.

Pekińskie Kolegium Esperantystów założyło początkową trzyklasową szkołę ludową dla niezamożnych dzieci. Nauka jest bezpłatna, nauczycielami są studenci z P.K.E. Esperanto jest prowadzone w drugiej i trzeciej klasie.

Esperanto w miejskiej szkole w Fischern.

Pod Karlsbadem w Fischern zostało wprowadzone Esp. do miejskiej szkoły, z powodu czego odbyła się tu oficjalna konferencja reprezentantów szkół miejskich okręgu Karlsbadu. Na porządku dziennym omawiana była sprawa programu nauczania języka Esperanto.

Czechosłowacja a Esperanto.

Esperanto w Czechosłowacji idzie szybkim krokiem naprzód. Oficjalnie jest Esp. wprowadzone do następujących szkół: do Akademji Handlowej i do gimnazjum (Königsgratz), do Akademji Handlowej i Szkoły ludowej (Olmütz), do szkoły Handlowej (Brünn), do szkół miejskich (Aüssig, Neu-Paka i Śląska Ostrawa).

Lektoraty Esperanta zostały ustanowione w Techniczn. Szkole w Pradze, lektorat języka międzynarodowego Esperanto w Wyższej Szkole Górniczej w Pribram.

Esperanto i niewidomi.

Esp. zostało wprowadzone do instytutów dla ociemniałych w Klár i Hradčany w Czechach.

Nauka Esperanta w więzieniu.

Donoszą z Kowna (Litwa), że dzięki poparciu Min. kultury odbywają się w tamtejszym więzieniu dla politycznych przestępców kursy języka Esperanta

Decyzja Kongresu Żeglugi Napowietrznej.

Trzeci Międzynarodowy Kongres Żeglugi Napowietrznej (Bruksella 1925), rozumiejąc, jak wielkie znaczenie ma Esp. w stosunkach międzynarodow. postanowił utworzyć Międzynarodową komisję, która zajęłaby się rozpowszechnieniem Esperanta i wprowadzeniem go do żeglugi napowietrznej.

Esperanto i radio.

Prawie wszystkie poważniejsze radio-stacje w Europie, Ameryce, Australji i Azji nadają programy esperanckie, przemowy i kursy. Statystyka wskazuje, że od 1 stycznia 1923 do 1 kwietnia 1925 r. odbyło się przez radio 118 przemów (68 o Esperanto i 50 po esperancku), oraz 20 kursów z pięćdziesięciu stacji trzech kontynentów.



Ricevita letero.

Varsovie, 13. IX 1926

Al la Organiza Komitato de la I-a Tutpollanda Konferenco de Esperanto en Kraków.

Konsiderante, ke Tutpollandan Konferencon de Esperanto rajtas, konforme kun la decido de la Konferenco de 1925 jaro konvoki nur ĉiuj centraj organizacioj Esperantistaj en Polujo,

la Varsoviaj societoj klarigas ĉi pere, ke en la organizado, same kiel en la laboroj de la „tiel nomata“ I-a Tutpollanda Konferenco de Esperanto en Kraków (30. X kaj 1. XI 26) ili ne partoprenas.

Subskribis: A. Stankiewicz, vicprezidanto en nomo de Pola Esperanto-Asocio. (—) M. Szenfeldówna, E. Wiesenfeld en nomo de E. R. „Konkordo“, (—) J. Burkathówna en nomo de Pola Studenta Esperantista Societo (—) I. Koss en nomo de Esperantista Societo „Laboro“.

Rim de la Red. Ni klarigas la situacion pri la organizata konferenco en Kraków. En la jaro 1925 tri varsoviaj societoj, nome Pola Esperanto - Asocio, Akademia Esperantista Rondo kaj Pola Studenta Esperantista Societo organizis en Warszawa konferencon de delegitoj de ĉiuj pollandaj grupigoj. Ĝin partoprenis ankaŭ f-ino Weinberg, kiel reprezentantino de Krakowa Societo „Esperanto“. Dum tiu konferenco oni decidis aranĝadi konstantajn kunsidojn de grupigaj reprezentantoj en ĉiuj lokoj, kie estas pli ol unu societo. Tiuj delegitaraj kunsidoj devis esti unua paŝo al pli forta tutpollanda organizaĵo.

Krome oni decidis, ke pollandaj konferencoj poste estos kunvokataj post interkonsento

inter centraj estraroj de ĉiuj tutpollandaj societoj. Al la lastaj apartenas Pala Esp. - Asocio, Rondo „Konkordo“ kaj Societo „Laboro“. Ili reprezentas preskaŭ ĉiujn ideojn ekzistantajn inter la pola samideanaro.

30—X kaj 1—XI Krakova Societo „Esperanto“ kunvokas tutpollandan konferencon, kies tasko estos krei Pollandan Esperanto-Delegitaron.

Tamen ĉar la konferenco ne estas kunvokata laŭ la decido de la 1925 j., do ĉar la konferenco ne estis antaŭe preparolita inter la centraj estraroj, la subskribitaj kvar societoj sentis sin devigitaj protesti kontraŭ tio kaj ne partopreni.

Ni tamen esperas, ke la situacio klarigos tre baldaŭ, ĉar ambaŭflanke estas bonaj intencoj.

Redaktoro kaj eldonanto: Stanisław Karolczyk.

Sekretario de la Red.: Mieczysław Trochimowski.

Presejo: Fratoj Wójcikiewicz, Warszawa, Pawia 10.

La bone konata kaj en ĉiuj landoj uzata

B E S - Adresaro

de Esperantistoj el ĉiu landoj
aperos denove en 6-a eldono-aŭtune 1926.

Aligu senprokraste!

Simpla aligo 0.25 Fr. sv. aligo kun adresaro
0.50 Fr. sv. publikigo de porteto 0.50 Fr. sv, anonca

ĉinio 0.25 Fr. sv. 1.-Fr. sv. = 2.-p. zl.

Eldonas: Bohema Esperanto-Servo, Moravany, Ĉsl.

Reprezentanto por Polujo:

J. S a p i r o, Białystok, Lipowa 33.

Poŝtëkkonto: Varsovio 60.047.

Esperantyŝci!

**Czytajcie i rozpowszechniajcie
tygodnik**

WSPÓLNOTA

organ Związku Spółdzielni Spożywców Rzeczp.
które prócz artykułów o treści społecznej, kultu-
ralnej i tp. zawiera

Kącik esperancki

redagowany przez p. Ignacego Kossa i zawierający
artykuły o teorii, historii i postępach Esperanta
oraz bogatą kronikę.

Adres: Warszawa, Mokotów ul. Czajny.

Konto w P. K. O. Nr. 87-80.

Prenumerata wynosi kwartalnie 2.80 zł.

Polskie Akademickie Tow. Esperantystów

zorganizowało

K U R S

Korespondencyjny

jęz. międzynarodowego Esperanto.

Zapisywać się można w każdym czasie

pod adresem

p. Haliny Weinsteinówny

Łeszno 99, m. 5, Warszawa

Całkowity kurs wynosi zł. 7.

Nowoczesny sposób nauczania przez korespondencję dał już świetne rezultaty.

Korzystajcie więc ze sposobności.